

& La griloj:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 394 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo feroaj de Olav Rajdistrozo.>

(#Melodio:

<2,3:4> (

/mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do Ti; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o)×...)+

(&Strofoj:

'1 Antaŭ la naskiĝ' de2 l' karaj

(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)

Muzoj, laŭ la oni2diroj,

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj! ; /Iru plankon, dancu kun /granda em'!**!))

'2 homoj estis ordinaraj, ankaŭ la kamparaj griloj.

'3 Sed kiam aperis Muzoj, kaj por dolĉaj kor-amuzoj

'4 la unuaj kantoj sonis, la gril-homoj tiel dronis

'5 en plezur', ke ili ĉesis pri si zorgi, eĉ forĝesis

'6 manĝi, trinki, kaj konstante kantis nur, ne rimarkante,

'7 kantis nur, ne rimarkante, ke per tio ili lante

'8 sin mortigas. Ili devis morti home, sed ricevis

'9 grilan korpon, plu kanzonis, al ili la Muzoj donis

'10 la donacon, ke dumvive senmalsate, sensoife

'11 ili kantu, kaj post morto ili iru kun raporto:

'12 Kiu do la Muzojn tere kultas kaj honoras vere.)